Recenzo

PREZO Sm. 0,125

# La Tagiĝo

## Kanto Esperantista.

Originale Verkita de ANTONI GRABOWSKI.

Muziko de BARAŃSKI

2a PRESO
LAŬ PERMESO DE L' AŬTORO.

1915.
Eldono de J. L. BRUIJN, Hago (Nederlando).

# LA TAGIĜO.

## Kanto Esperantista.

Poezio de ANTONI GRABOWSKI. Muziko de BARAŃSKI.



Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto;
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
    Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
    La ombroj de nokto forkuras el mond'.

        Post longa migrado sur dorna la voj',
        Minacis nin ondoj de l' maro,
        Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
        Al verda haven' de l' homaro.
            Post longa batalo, maldolĉa turment'
            La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal'.
Ni estas jam bone harditaj,
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
    Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
    Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

        Ni velas antaŭen, kun kredo, fervor',
        Benante la Majstron por verko,
        Kaj lian anaron, de plej frua hor',
        Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
            La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,
            Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela,
    Kaj same fidelaj al hejma altar'
    Ni sentas nin filoj de l' tutaj homar'.

        En ĉiu mond-parto, en ĉiu ter-zon,
        En koroj de centoj da miloj,
        Jam vibras por nia saluto reson',
        Do kantas de l' tero ni filoj:
            Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
            La ombroj de nokto forkuras el mond'.

Originale verkis ANTONI GRABOWSKI.

# ESPERANTO-LIBREJO

DE

:: **J. L. BRUIJN** ::

**WEIMARSTRAAT 282, HAGO**

(NEDERLANDO)

**KATALOGO SENPAGE RICEVEBLA**



# La Holanda Pioniro

OFICIALA ĈIUMONATA ORGANO DE L' NEDERLANDA SOCIETO ESPERANTISTA

:: APERAS DULINGVE, MEZE DE L' MONATO ::

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Jarabonprezo:** | **Por Nederlando** . . | **Sm.** | **0.750** |
| | **„ Belgujo** . . . | **„** | **0.833** |
| | **„ aliaj landoj** . . | **„** | **1.—** |

:: Administrejo Weimarstraat 282, Hago. ::


ELEKTRA PRESEJO „NOVA VIVO", HAGO.